

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de NEL

ĵaŭdon la 20an de novembro 2014

per retkomunikilo skajpo

Partoprenis:

Anne Karin Bondhus en Bryne
Ulf Lunde en Os/Hordaland
Amelie Matt en Tromsø
Herman Raner en Trondheim

0a. Estrado

Ni elektis kiel estron kaj protokoliston dum la foresto de Jardar kaj Mario: Ulf Lunde kaj Herman Raner.

0b. Tagordo

Ni aprobis la tagordon. Ne estis eventualaĵoj krom tiu sub 5: «Libraro de Tron Øgrim», jam enmetita en la version de la tagordo dissendita pli frue hodiaŭ.

1. Aprobo de protokolo

Ni aprobis la protokolon de la pasinta interkonsiliĝo, la 23an de oktobro 2014.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomia stato.

	Fondaĵo Skagen Vekst A	Fondaĵo Skagen Høyrente	
Novembro	45 376	125 954	
Oktobro	43 204	125 796	
<u>Kreskis</u>	<u>2 172</u>	<u>158</u>	NOK

3. Resumo de la seminario la 1an de novembro 2014

Partoprenis entute 21 personoj en sep diversaj lokoj: Tromsø, Trondheim, Os/Hordaland, Oslo, Uppsala, Bryne kaj Kviteseid.

Kiel komunikilo ni uzis la Interretan servon «Skype», aŭ Skajpon.

Kvar diversajn artefaritajn lingvojn oni prezentis – en kronologia ordo laŭ kreado. Post enkonduko de Amelie Matt kvar prelegantoj prezentis lingvojn: Herman Raner prelegis pri Solresolo (SolReSol), Douglas Draper pri Interlingvao (Interlingua), Mario Machlik pri Volapuko (Volapük) kaj Anne Karin Bondhus pri Klingona lingvo (tlhIngan). Post ĉ. kvar horoj de prelego, diskuto kaj iom de teĥnikaĵoj ni fermis la seminarion, kies laborlingvo kompreneble estis Esperanto.

La komenco de la seminario – kaj kelkaj prelegoj – iom prokrastiĝis pro nestabila retservo,

sed ni sukcesis kunesti dum la programo sen perdi partoprenantojn pro teĥnikaj kaŭzoj.

Ni konkludu ke sukcesis la seminario pro ĝia interesa enhavo, malgraŭ la komunikadteĥnikaj problemoj dum la seminario.

4. Datoj por interkonsiliĝoj

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 8an de januaro 2015. Ni ne okazigu interkonsiligon decembron 2014. Intertempe, antaŭ la 8an de januaro, ni interkonsiliĝu neformale per retpoŝto pri taŭgaj ĵaudoj la unuan duonjaron 2015.

5. Libraro de Tron Øgrim

Nia membro Tron Øgrim forpasis antaŭ kelkaj jaroj. Fine de oktobro liaj vidvino kaj filinoj donacis al NEL lian libraron.

La estraro pritraktas tiu mesaĝo nur kiel informo, kaj oni devas poste diskuti kion fari pri la ricevitaj libroj.

6. Eventualaĵoj

Vidu 0b.

Raportis Herman Ranes

Trondheim / 2014-11-20